

Interveno de la reprezentantoj de Universala Esperanto-Asocio Homrajta Konsilio, 9^a sesio, Unuiĝintaj Nacioj, Ĝenevo, 17 septembro 2008

Sinjorino Alta Komisiitino, Sinjoro Prezidanto, Gesinjoroj,

Ni reprezentas ĉi tie Universalan Esperanto-Asocion¹, la mondan organizaĵon de esperantoparolantoj, kies reto kovras ĉiun kontinenton. Nia asocio, kaj la esperantoparolantoj ĝenerale, estas aparte atentemaj pri homaj lingvaj rajtoj, kaj laŭ ni tiuj devus esti pli klare agnoskataj kiel unu el la homaj rajtoj kaj defendataj pere de la lingvo politike neŭtrala, Esperanto. Nia asocio subtenas interalie la proponon pri studo de la lingvaj homaj rajtoj, prezentita de la organizaĵo EBLUL (Eŭropa buroo de malpli uzataj lingvoj)².

Mi ripetas ĉi tie nian proponon, prononcita la 2-an de septembro 2008, en tiu ĉi salono, dum la Socia Forumo de la Konsilio pri Homaj Rajtoj, diskutinta la temon de la malriĉeco en la mondo, koncerne la kontribuon de nia movado, kiel peranto en regionoj, kie la homoj ne parolas aŭ ne bone komprenas la oficialajn lingvojn de UN, kaj kie bedaŭrinde ekzistas multaj problemoj pro malriĉeco.

Ni proponis ke ni faru la tradukon en Esperanton de la fina dokumento de konkludoj kaj rekomendoj de la Forumo, kaj ni realigu ties distribuon helpe de nia tutmonda esperantista reto. Ni intencas ankaŭ fari tradukojn de tiu dokumento en kelkajn lokajn lingvojn, aliaj ol la oficialaj de UN, per la kunlaboro de niaj membroj.

Kiel vi scias, ni devis printi kaj deponi ĉi tie la tekston de nia alparolo en 25 ekzempleroj, kaj ni esperantistoj esperas, ke iam ni povos transdoni tian dokumenton en 25 lingvoj !

Mi dankas vin pro via atento.

Unuiĝintaj Nacioj, Ĝenevo, la 17-an de septembro 2008
(Charmian Common & Stefano Keller, UEA)

www.esperanto.net – www.uea.org – www.lernu.net
www.droits-linguistiques.org – www.linguistic-rights.org

¹ kaj ² http://ap.ohchr.org/documents/sdpage_e.aspx?b=10&se=79&t=7
Mallonga adreso: <http://uri.fi/CD/> aŭ <http://minilien.fr/a0jdy4>

1) A/HRC/9/NGO/46 - "Written statement submitted by the Universal Esperanto Association, a non-governmental organization in special consultative status" - La position de l'Association Universelle d'Espéranto au sujet des droits linguistiques

2) A/HRC/9/NGO/6 - "Written statement submitted by the European Bureau for Lesser Used Languages EBLUL, a non-governmental organization in special consultative status" - 2008: Année Internationale des Langues - Proposition pour une Déclaration Universelle des Droits Linguistiques